nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2013

## EKSTERORDINARA KUNSIDO

Kiel anoncite en la pasinta numero, la 21an de oktobro 2013 okazis Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo. Jen la oficiala protokolo (en la hispana):

> En la sede de la Federación Española de Esperanto el 21 de octubre de 2013, a las 19,30 horas se reúne en segunda convocatoria la asamblea general extraordinaria de Esperanto-Liceo de Madrid, con asistencia de 8 socios presentes más 2 representados, con el siguiente orden del día.
>
> Punto único.- Modificación de los estatutos
>
> Tras el cambio de domicilio, el artículo 1º de los estatutos pasa a tener la siguiente redacción:
>
> "ESPERANTO-LICEO DE MADRID (MADRIDA ESPERANTO-LICEO) es una asociación de carácter socio-cultural, no lucrativa, cuya sede social está en la calle Rodríguez San Pedro 13-3º-7 de Madrid 28015."
>
> La modificación se aprueba por unanimidad.
>
> Antes de dar por terminada la sesión, se imprime la presente acta y se somete a la aprobación de la asamblea, resultando aprobada por unanimidad.
>
> Al no haber más asuntos que tratar el Presidente dio por terminada la Asamblea General Extraordinaria a las 20:00 h.

## NOVAĴOJ DE LICEO

Ĉiuj membroj (nunaj kaj ontaj) de Esperanto-Liceo de Madrid memoru ke en venonta januaro oni renovigos la estraron, ĉar la nuna estis elektita en januaro de 2010. Pripensu la eblecon kandidati aŭ fari aliajn proponojn.

La redaktoro de *Nia Voĉo* ankaŭ montris deziron transdoni la taskon al alia samideano. Pripensu vian kandidatiĝon por tiu kunveno.

Aliflanke, Madrida Esperanto-Liceo festos la Zamenhofan Tagon, kiel kutime, la 15-an de decembro, kiu ĉijare okazos en dimanĉo. Oni ankoraŭ ne decidis pri la maniero ĝin festi, kaj do ĉiu ideo estas bonvena. Kontaktu kun la sekretario en madrido@esperanto.es

La sekretario de MEL renkontiĝis kun juna samideano kiu aktivas en la Asociación de Vecinos de Manoteras. Preskaŭ certe ni muntos tie la ekspozicion *"Esperanto, lengua y cultura"* kaj eble ankaŭ en la apuda mezlernejo Arturo Soria. Ni plu informos prie.

## NOVAJ ŜANĜOJ EN LA LOKO DE LA KURSOJ

La instruado far Juan del Castillo denove ŝanĝis lokon, tial ke la nombro da lernantoj superas la kapaciton de la HEFejo. Nun ĝi okazas en *Centro Social Autogestionado La Tabacalera*, en strato Embajadores 53, metrohaltejo Embajadores.

La kursojn oni anoncis en la retejo de la socia centro:

http://latabacalera.net/bohemia/cursos-gratuitos-de-esperanto-sabados-1100/

## PROFILO EN FEJSBUKO

Ekde antaŭ kelkaj tagoj MEL havas profilon en Facebook. La grupo nun estas Esperanto Madrido. Serĉu nin tie.

## ESPERANTA FLAGO EN MADRIDA FILMO

En la kultura centro "Matadero" en Madrido, estis elsendita meze de oktobro nova filmo pri la 15M-movado, kun titolo *"Vers Madrid (The Burning Bright)"*. Ĵus en la komenco de la unu-minuta prezenta filmeto aperas la Esperanto-flago. Jen ligo al ĝi:

http://www.mataderomadrid.org/ficha/2836/vers-madrid-%28the-burning-bright%29.html

## RETBULTENO DE HEF

Hispana Esperanto-Federacio lanĉis la unuan (provan) numeron de sia nova elektronika komunikilo, "La Bitbulteno". Ĝi estis sendita per retpoŝto kaj eblas ĝin aliri ankaŭ rete.

La bulteno estas dulingva, hispana kaj esperanta, kaj celas informi ne nur la anojn de la asocio, sed ankaŭ ĉiun homon interesiĝantan pri la lingvo kaj/aŭ la movado, ne nur en Hispanio, kvankam granda parto de la informoj ĝenerale temos pri iniciatoj en tiu parto de la terglobo. Se vi dezirus ricevi la venontajn numerojn, enmetu vian retadreson en la formularo kiun vi trovos en la dekstra (aŭ suba) parto de la plejmulto de paĝoj en la retejo http://esperanto.es/, aŭ sendu mesaĝon al letero@esperanto.es.

## NOVA PERANTO DE "LA ONDO"

En la novembra numero de "La Ondo de Esperanto", paĝo 23, aperas kiel nova peranto por Hispanio, nia iama samklubano Pedro A. Garrote. Se vi deziras ĝin aboni aŭ aĉeti, kontaktu lin ĉe la elektronika adreso hisperanto.uea@terra.com aŭ fizika: C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid

La elektronika abono de "La Ondo" por 2014 restas je 12 eŭroj kaj la papera je 42 €, aerpoŝte +5€.

## NIN VIZITIS

La 26-an de oktobro vizitis Madridon usona samideano George Partlow: li rendevuis en la centro de la urbo kun amikoj kun kiuj li kontaktis pere de socia reto Fejsbuko.

La 28-an de oktobro vizitis la sidejon Pablo Busto, nun loĝanta en Sevilo, profitante sian ĉeeston en Madrido pro laboraj kaŭzoj.

Gastas en Madrido dum kelkaj monatoj britia samideano Stuart Mack, kiu vizitis Liceon la 28-an de oktobro.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

La babilrondo novembra okazis la 2-an de tiu monato, en nova loko, la Kafejo Nova Apolo, strato Dr. Cortezo n. 15.

Atentu novaĵojn en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj ankaŭ en la retejo de MEL: http://www.esperanto.es/mel.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com